*Scienca Revuo* Vol. 45 (1994)(1)—164

# Burokrataro kaj Stalinismo

## Eksperimenta konceptado de totalisma perforto

Vladimir I. Ionesov, C.Sc

En la nuntempa etapo de konceptado de la soveta historio speciale aktualas la difino de la historia interligo de burokrataro kun totalismaj sociaj sistemoj.

En la scienca literaturo de lastaj jardekoj aperis serio de utilaj studoj pri historio kaj sociologio de burokratismo kaj monopolaj-potencaj rilatoj [1,2,4,6-8, 11,12,17,18]. Sed entute, tiu ĉi problemo estas solvata pli multe je la pritaksa nivelo ol je la eksplika. Krom tio, ofte totalismaj-burokrataj sistemoj (faŝismo, naziismo, stalinismo, maoismo) estas analizitaj el vidpunkto kaj sperto de la nuntempa historio eĉ se evidentas ke reglamenta konscio kiel fenomeno radikas en profunda antikveco. La lastaj esploroj en la sfero de la sociala historio de la antikvaj socioj estas ankoraŭ unu konfirmo al tiu ĉi fakto [5,9].

Altigo de burokratia korporacio kutime koincidas kun plifortigo de la centralizaj-potencaj funkcioj kun nelimigita diktaturo de la ŝtato. La historio scias multajn similajn ekzemplojn (Ŝan-Inj civilizacio, la Rusa ŝtato de la epoko de caroj Ivan la Terura kaj Petro la Granda k.a.) [10,13-16]. Tamen «la stela horo» de burokrataro kiel reganta socia tavolo okazis dum la totalismaj reĝimoj. Ĝuste en ili plej plene realiĝis la nepra kondiĉo de la totalisma regado-interplektiĝo kaj kunkreskiĝo de burokrataj strukturoj kun potencaj juraj kaj ideologiaj instancoj de la ŝtato.

*Scienca Revuo* Vol. 45 (1994)(1)—164

En genezo de preskaŭ ĉiuj totalismaj sistemoj videblas ankoraŭ unu leĝeco (reguleco) laŭ kiu la profunda epoka krizo kaj socia malkontento rezultigas formiĝon de totalismaj fundamentoj kun milita-politika diktaturo. En historia aspekto ĉi tiu krizo plej ofte estas ligita kun la transiraj periodoj en la socia evoluo [3]. Sekvinte ĝin, la ŝtata centraligo kun reglamenta-ideologia subpremado estas laŭleĝa reago pro disfalo de sociaj ligoj. Samtempe en la socio nepre formiĝas certa difinita super-ideo kapabla elirigi la socion el la stato de ekonomia rompo kaj morala dekadenco. Por plenumo de ĉi tiu super-ideo oni anoncas totalan mobilizon de ĉiuj sociaj strukturoj kaj ilia absoluta subigo al la ŝtata oligarkio, kiu realigas ĉi tiun populisman projekton. Ĉio, kio kontraŭstaras la planitan celon estas taksata kiel krimo kontraŭ la reĝimo, nacio, socio, ideologio kaj estas subpremata diktature. La ŝtata tuteco en totalisma sistemo determiniĝas per hierarkie organizita burokratia strukturo, kiu siavice ricevas de la reĝimo mandaton de absoluta potenco.

Malgraŭ ideaj diferencoj de la populismaj projektoj starigitaj antaŭ la socio, ĉiuj reglamentigemaj despotoj havas entute la samon principon de funkcio. Verŝajne la plej plena kunfandiĝo de la burokratia korporacio kun totalisma ŝtato okazis en la sovetia realo de la fino de la 20-aj ĝis la komenco de la 50-aj jaroj en la periodo nomata «stalinisma». La periodo de la «diktaturo de la proletaro» (pli precize «diktaturo de la ŝtato») kiel variaĵo de totalisma ordo estis antaŭ ĉio reago al ekonomia kaoso, ruiniĝo, politika nestabileco, nacia disfaliĝo, amasa malriĉiĝo de laboristoj, krizo de spirita kulturo, sekvoj de monda kaj enlanda militoj, foresto de demokratiaj tradicioj kaj mondkoncepta stagnado. La

stalinismo akceptis la stafeton de revolucia kontraŭstaro neeviteble nur por mallonga periodo de historio. Samtempe, absolutiginte la diktaturon, la stalinismo definitive elpremis el ĝi la proletaran enhavon kaj anstataŭis la demokratiajn atingojn per pure reglamenta-burokrata regado. Kaj en tiu ĉi aspekto la stalina totalismo estis, se ne fatala, certe laŭleĝa rezulto de la tuta antaŭa revolucia evoluo de Ruslando. La ŝtata aparato subigis ĉion kaj ĉiun. La ŝtato transformiĝis al giganta proprietulo parazitanta la homojn kaj sociajn rimedfontojn, kulturanta la sklavan psikologion kaj servutismajn ordojn.

La stalina totalismo naskiĝis ankaŭ dank' al la reglamentismaj provoj artefarite stimuli la historian procezon per perforta transformigo de la socio en senklasan ŝtaton. Dum tiuj ĉi provoj la historio kvazaŭ turniĝis inverse reanimigante turmentigan naskiĝon de la antikva-orienta despotio kun ties milit-demokratiaj kaj egaliga-primitivaj tradicioj:

a) Primitiva egalismo montriĝis en perforta egaligado, en kolektiva-neniesa proprieto, en perforta forpreno de la produktanto la rezultojn de ties laboro.

b) Centraliza direktado de la ekonomio, karakterizo de la antikvaj-orientaj socioj, estis reproduktita en la formo de ŝtat-burokratia monopolo en ĉiuj sferoj de la ekonomia vivo.

c) Severe socitavola-hierarkia strukturo de administrado kaj organizado de socia produktado, karakterizo de la fruaj-centralizitaj ŝtatoj, respondis iusence al social-diferenciga sistemo de ekonomia distribuo kaj al direktiva planado.

d) La malforta dispartigeco de la politika kaj ekonomia agadsferoj en fruklasaj socioj kaj la tradicia koncentrigo de potenco en la manoj de unu gvidanto kaj

*Scienca Revuo* Vol. 45 (1994)(1)—164

ĝia sekva sanktigo klare montriĝis en la kunfandiĝo de la parti-burokratia oligarkio kun la ŝtataj instancoj kaj en la koncentrado de la absoluta potenco en la manoj de idea-politika gvidanto. Ĉirkaŭ li formiĝis aŭreolo de sankteco, kaj li estis intence transformita lin al Mesio, al «la granda Piulo» kiu sole povas savi la homaron kaj konduki ĝin en «la helan estontecon».

Sekvo de tiuj ĉi procezoj estis la sanktigo de la potenco kaj de la dominanta ideologio, kaj, kio ankoraŭ pli gravas, la totala mitologiigo de la socia konscio. En aŭtokrataj sistemoj burokrataj strukturoj kvazaŭ duoble refalas en sian dispartigitan primitivan staton, kunigante en si ĉiujn sociajn-ekonomiajn kaj politikajn-ideologiajn funkciojn. Al la karismaj ideoj disvastigitaj de la ŝtato, kvazaŭ reeĥo de primitiveco, nombas la kulto de la gvidanto kaj de ties postmortaj restaĵoj, sanktaj ideologistoj, kaj kontraŭstaraj dualaj nocioj pri bono kaj malbono (proletaro kaj burĝaro), lumo kaj mallumo (socialismo kaj kapitalismo), piuloj kaj pekuloj (partio kaj malamikoj), herooj kaj sabotantoj (staĥanovanoj kaj disidentoj), ktp. Ĉio devis kontribui al disvastigo de tiaj socialaj fenomenoj de totalismo kiel amasa ideologia hipnoto: reprezalioj (oferdonoj sur la altaro de la «dia» ideo de komunisma estonteco) kaj fetiĉigo de simbolaro (kulto de martelo kaj serpo, ruĝa stelo, ktp).

Reproduktado de burokratiaj strukturoj dum totalisma realo efektiviĝas pere de reglamentado de gejunuloj, analoge al primitivaj ritoj de inico. Nur trainrinte tutan ciklon de administre komanditaj sanktaj konformiĝoj (de oktobretulo kaj pioniro ĝis komunisto) individuo ricevas «la soifatan» mandaton de la reganta partia oligarkio kaj fariĝas «plenvalora» membro de la ŝtata-burokrata nomenklaturo. Tamen tio estis ne tiom

*Scienca Revuo* Vol. 45 (1994)(1)—164

renaskiĝo de arkaismaj tradicioj, kiom la totalisma transformiĝo de ĉiuj socitavolaj mekanismoj de potenco en alian historian realon helpe de potencega aparato de ŝtata subpremo de personeco.

Kompreneble, ne ĉiuj konataj socialaj atavismoj portas negativan ŝarĝon kaj estas ekskluzivaj antaŭkondiĉoj de totalismaj reĝimoj, sed ĝuste en tiuj ili akiras la detruigan econ kaj agas kontraŭ la homo.

## LITERATURO


1. Arendt H. ***The origins of totalitarianism***, New York, 1955.
2. Brzezinski Z.K. ***The grand failure***, Collier Books, New York, 1990.
3. Erŝov Ju.G. ***Ĉelovek. Socium. Istorija***, Sverdlovsk, 1990, p 79-145.
4. Friedrich K.J., Brzezinski Z.K. ***Totalitarianism, dictatorship and autocracy***, Cambridge (Mass), 1956.
5. Gosudarstvo I. ***Social'nye struktury na drevnem vostoke,*** Moskva, 1989.
6. Hayek F.A. ***The road to serfdom***, London, 1944.
7. Ĥasbulatov R.I. ***Burokratija toŝe naŝ vrag... (Socialism i burokratija)***, Moskva, 1989.
8. Mogil'nickij B.G. ***Al'ternativnostj v istorii sovetskogo obŝĉestva. - Voprosy istorii***, 1989, n° 11, p 3-16, Moskva.
9. Klassy i. ***Soslovija v dokapitalistiĉeskiĥ obŝĉestvanasii. Problema social'noj mobil'nosti***, Moskva, 1986.
10. Pavlenko N.I. ***Vistokov rossijskoj burokratii. - voprosy istorii***, 1989, n° 12, p 3-17, Moskva.

*Scienca Revuo* Vol. 45 (1994)(1)—164

11. Schapiro L. *The origins of the communist autocracy*, London, 1956.
12. Simonija N.A. *Čto my postroili*, Moskva, 1991.
13. Skrynnikov R.G. *Opričnyj terror*, Leningrad, 1969.
14. Ŝmidt S.O. *Stanovlenie rossijskogo samoderĵavij*, Moskva, 1973.
15. Vasil'ev L.S. *Stanovlenie političeskoj administracii. - Narody afriki i asii*, n° 1, Moskva, 1980.
16. Vasil'ev L.S. *Problemy genezisa kitajskogo gosudarstva*. Moskva, 1983.
17. Vittenberg E.J. *Strašnoe i čudoviščnoe. (O kulte ličnosti i reĵime ličnoj vlasti) - Kvintessencija. filosovskij al'manaĥ*, p 236-252, Moskva, 1990.
18. Wolfe B.D. *Communist totalitarianism: keys to the soviet system*. Boston, 1956.

Supera Scienca Kunlaboranto de la Instituto de Arkeologio de la Akademio de Sciencoj de Uzbekistano. ul. Akad. Abdullaeva 3, 703051 Samarkand, Uzbekistan.

Poŝta adreso de la aŭtoro: Vladimir I. Ionesov
53 Sharof Rashidov Str.
703000 Samarkand, Uzbekistan

La eldonintoj ne samopinias kun ĉiuj tezoj kaj eldiroj de la aŭtoro kaj estas pretaj, publikigi kontraŭajn argumentojn en la sama amplekso.